Citaĵoj el la verkaro de Zamenhof

1. La multepeza malfeliĉo de diverslingveco

En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj; ĉiuj el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ ĉefa, kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj. [Letero al N. Borovko 189?; ĉi tie citita laŭ Zamenhof 1929:418.]

—

En mia infaneco mi amis tre pasie la lingvon rusan kaj la tutan rusan regnon; sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke mian amon oni pagas per malamo, ke ekskluzivaj mastroj de tiu lingvo kaj lando nomas sin homoj, kiuj vidas en mi nur *senrajtan fremdulon* (malgraŭ ke mi kaj miaj avoj kaj praavoj naskiĝis kaj laboris en tiu ĉi lando), ĉiuj malamas, malestimas kaj premegas miajn fratojn; mi vidis, ke ankaŭ ĉiuj aliaj rasoj loĝantaj en mia urbo sin reciproke ĉiuj malamas kaj persekutas ... kaj mi multe suferis de tio ĉi, kaj mi komencis revadi pri tia feliĉa tempo, kiam malaperos ĉiuj naciaj malamoj, kiam ekzistos lingvo kaj lando apartenantaj plenrajte al *ĉiuj* siaj uzantoj kaj loĝantoj, kiam la homoj ekkomprenos kaj ekamos unuj la aliajn. [Letero al Michaux 1905 02 21, ĉi tie citita laŭ *Enciklopedio de Esperanto* paĝo 580.]

2. Ebla estonta unulingveco de la homaro

Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistus la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo. [Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia; ĉi tie citita laŭ Zamenhof 1929:281.]

3. Persona deveno

Ĉar tuj en la komenco de mia rakonto mi devus necese raporti, ke mi estas hebreo kaj ĉiuj miaj idealoj, iliaj naskiĝo, maturiĝado kaj obstineco, la tuta historio de miaj konstantaj bataladoj internaj kaj eksteraj – ĉiuj estas sendisige ligitaj kun tiu ĉi mia hebreeco. (Leteroj I, p. 106). [Citita laŭ Maimon 1978:202.]

—

Zamenhof mem difinis sin "ruslanda hebreo" (Leteroj I, p. 115). [Citita laŭ Maimon 1978:201.]

—

Mia gepatra lingvo estas la *rusa*; sed nun mi parolas pli pole, kaj mi nomas min ne "ruso" sed "Rusujano". [Letero 1901 03 08 al Th. Thorsteinsson, Kopenhago, ĉi tie citita laŭ Zamenhof 1929:523.]

—

En la okazo, se Vi nepre bezonas paroli pri mia persono, Vi povas min nomi "filo de pola lando" (ĉar neniu povas nei, ke la tero, en kiu kuŝas ambaŭ miaj gepatroj kaj sur kiu mi konstante laboras kaj intencas labori ĝis mia morto, estas mia hejmo, kvankam mi ne estas naciisto), sed ne nomu min "polo" por ke oni ne diru, ke mi – por akcepti honorojn – metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas. [Letero al la Loka Kongresa Komitato de la Krakova Kongreso (1912); ĉi tie citita laŭ Maimon 1978:203.]

4. Sennacieco kaj homaranismo

Sed tiel same kiel mi en la nuna momento ne estas ia naciano, sed simpla homo, tiel same mi ankaŭ sentas, ke en tiu ĉi momento mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio, sed mi estas nur homo. [Parolado ĉe la unua kongreso 1905 en Bulonjo ĉe maro; ĉi tie citita laŭ Zamenhof 1929:365.]

—

Mi mem bedaŭrinde devas stari flanke de la afero, ĉar, laŭ miaj konvinkoj, mi estas "homarano", kaj mi ne povas ligi min kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj – kiel natura sindefenda reago – estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed, se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala.

Tio estas la kaŭzo, pro kiu mi malgraŭ la korŝirantaj suferoj de mia gento ne volas ligi min kun hebrea nacionalismo, sed mi volas labori nur por interhoma justeco *absoluta*. Mi estas profunde konvinkita, ke per tio mi alportos al mia malfeliĉa gento multe pli da bono, ol per celado nacionalisma. [Respondo de 1914 06 30 al invito partopreni fondon de Hebrea Ligo en Parizo; ĉi tie citita laŭ Zamenhof 1929:344–345.]

—

Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo. [Deklaracio pri Homaranismo, artikolo I; ĉi tie citita laŭ Zamenhof 1929:339.]

Fontoj

Enciklopedio de Esperanto. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1979. (Represo de la unua eldono de 1933.)

Maimon, N. Z. *La kaŝita vivo de Zamenhof.* Japana Esperanto-Instituto, Tokio, 1978.

Zamenhof, L. L. *Originala verkaro.* Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig, 1929; fote reproduktita en 1983 de Oriental-Libro, Osaka.